

PENSEO

N-ro 179

Sept../2006

Monata Beletra Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994


Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 17-a jaro <http://www.elperno.net/penseo/penlisto.htm>

Qin Guan (1049-1100)

FEOJ ĈE LA PIGA PONTO

Varias delikataj nuboj flue.
Disiĝbedaŭron steloj portas plue.
Arĝentan Rojon transiri senbrue.
En hor' de jada ros' kaj ora vento,
nur foja renkonto,
sed jam superas multe pli ol cento
en la homa mondo.
Ilia amo kiel milda roĵo
similas, kiel songĝ'— revid' en ĝojo.
Sed tuj disigas la revena vojo!
Se vera amo longdaŭri sukcesas
inter geamatoj,
ĉu la ĉiama kunestad' necesas
en tagoj, monatoj?

Tradukis **Guozhu** (2006-08-30)



Ĉinesko

Zhuang Qixiong



laŭ melodio Tiaoxiaoling

I

Muta, muta,
Knabin' kun larm' guta.

Ŝi ne povas lerni
kaj sin bonguvernĵi.
Nivel', nivel',
jen plej riĉa rivel'?

II

Blinda, blinda,
patrin', tre glorinda!
Ŝi kantadas sur strat'
por kora surogat'.
Tago, tago,
pli tima ol vago?




Amlaboro

laŭ melodio Busuanzi

Surstrate lampoj
— brilaj koloroj.
Ŝi laŭtvoĉe kolportas
kun freŝaj floroj.

Mon-kesto plenos
post am-laboroj.
Al malriĉaj infanoj
kun cent favoroj!



Vivo pri Esperanto


laŭ melodio Tiaoxiaoling

I

Bela,bela
lingvo, ja anĝela ?
Kun pacista flago
por feliĉa tago!
Gota,gota
mondo, ne despota !

II

Pala,pala
vivo, ideala ?
Ne povu eksplodi
de dolĉa melodi' !
Dilo,dilo,
kun hom-ama brilo !



Estro kaj Ŝtelisto

Liu Guofang

Ŝtelisto, malbonŝanca, renkontis revennantan estron, kiam li priŝtelis ties oficejon. Kune kun la estro eniris lia ŝoforo. Kiam ili malfermis la pordon de la oficejo kaj ŝaltis la lampon, ili vidis la ŝteliston. Ili ambaŭ tuj komprenis, kio okazas. Rapidmova, la ŝoforo tuj sin ĵetis antaŭen por kapti la ŝteliston. Sed neniom da timo ekhavis la ŝtelisto, kiu sidis ĉe la ofictablo, kaj li eligis laŭtvoĉan krion, “Kion vi volas fari?”

Ĉe la kriado, la ŝoforo eĉ ne kuraĝis antaŭeniri, kaj haltis. Post momento, la ŝoforo

refariĝis klarkapa kaj sciis, ke antaŭ liaj okuloj estas ŝtelisto. Do, kun malestima ekkrio, li komencis primokis la ŝteliston, “Vi eĉ aspektis kiel mia eestro, ĉu?”

La ŝtelisto respondis, “Mi ja estas via estro nun.”

Post kelka pririgardado, la ŝoforo ŝajne sentis, ke la ŝtelisto vere aspektas kiel estro, sed ne kiel la tipa ŝtelisto, kiun oni priskribas. Tiam la ŝtelisto, kun aŭtoritata tono de estro, komencis alparoli, “Tio ne koncernas vin. Vi foriru.”

La ŝoforo demandis, “Kial?”

La ŝtelisto daŭrigis, “Mi jam trovis multajn privatajn sekretojn de via estro en lia tirkesto. Jen la kialo. Ĉu vi volas informiĝi pri tiuj sekretoj de via estro per via ĉeesto ĉi tie?”

Tiuj vortoj senparoligis la ŝoforon. Ĵetinte sian ekrigardon al sia estro, li foriris.

Post la foriro de la ŝoforo, la estro staris sola en la oficejo. Ekrigardinte al la estro, la ŝtelisto fingromontris apudan sofion, dirante al la estro, “Kial vi staras tie? Sidiĝu!”

La estro estis tenanta sian buŝon fermata, sed nun li ekparolis, “Ŝajnas, ke vi vere estas estro, ĉu ne?”

La ŝtelisto diris, “Nun mi havas rajton vin estri.”

La estro kontraŭdiris, “Per kio?”

“Per tiuj aĵoj en via tirkesto.”

Senparole, li sidiĝis laŭ la ordono de la ŝtelisto.

Post lia sidiĝo, la ŝtelisto komencis instrui kun la estreska tono, “Rigardu, kion vi superuloj faras. Via tirkesto plenas je amleteroj de virinoj, kaj fotoj, sur kiuj vi kaj virinoj intime brakumas! Kia mor-veneniga skandalo!”

Li daŭrigis, “Se tiaĵojn vidus aliaj kaj via edzino, vi certe ne povus daŭrigi vian oficon.”

Ĉe tiuj vortoj eĉ kapjesadis la estro, kiu tiam jam perdis sian aŭtoritaton. Vidinte lian kapjesadon, la ŝtelisto, elstariginte sian

bruston, daŭrigis, “Estas ne facile por vi okupi ĉi tiun pozicion. Mi ne lasos tiaĵojn publike konataj, ĉar mi ne volas fari malfavoron al vi.”

La estro kapjesis refoje, dirante, “Dankon!”

La ŝtelisto plue diris, “Sed mi neeble foriros kun malplenaj manoj.”

La estro eĥis, “Neeble, neeble.”

Dirante, la estro nature elpoŝigis sian monujon kaj donis 600 yuan al la ŝtelisto. Malkontente, tiu riproĉis al li, “Nur tiel malmulte da mono?”

La estro respondis, “Mi kunportas nur tiom.”

La ŝtelisto ordonis, “Envoku vian ŝoforo. Ofte la ŝoforo kunportas monon por vi.”

La estro envokis sian ŝoforon kaj demandis, “Ĉu vi kunportas monon?”

“Jes, 1000 yuan.”

“Do, donu ĉiom al li.”

La ŝoforo ne faris movon.

La ŝtelisto diris, “Ĉu vi ne aŭdis la vortojn de via estro?”

La estro ripetis sian ordonon, “Donu ĉiom, kiom vi kunportas.”

La ŝoforo elpoŝigis sian monujon kaj donis 1000 yuan al la ŝtelisto.

Ricevinte monon, la ŝtelisto leviĝis kaj foriris.

Post lia foriro, la estro revenis al sia ofictablo. Li ekzamenis tirkestojn. Ĉimomente li trovis sin trompita, ĉar la ŝtelisto tute ne sukcesis perforte malfermi tiujn tirkestojn, tio estas, li tute ne povis vidi tion, kio sin kaŝis en tirkesto. Reveninte al sia klara kompreno pri la situacio, li hasteme urĝis sian ŝoforon, dirante, “Kaptu tiun ulaĉon rapide.”

Tiu hastis eksteren. Tamen, regis peĉe nigra nokto. La ŝtelisto jam malaperis senspure.



esperantigis **Samio**

El Libro de Poezio

Suno kaj Luno

**virino forlasita de la edzo kun frosta koro elverŝas sian koleron.*

Ho, la suno kaj la luno
 Brilas sur tero per lumo.
 Kial al fripon' permesas,
 Ke la amon li forgesas!
 Kiam mi turmenton finas?
 Li jam ne al mi inklinas.
 Ho, la suno kaj la luno
 Kovras la teron per lumo,
 Kial fripono ekzistas,
 Kaj perfidon li insistas!
 Spite al l' edzina volo,
 Li lasas min en izolo.
 Suno, luno en silento
 Brilas sur la oriento.
 Jen estas tia fripono,
 Sen la konscienco homo,
 Pri l' edzino li ne temas,
 Triste mia koro tremas.
 Suno, luno en silento
 Brilas sur la oriento.
 Ho, miaj panjo kaj patro,
 En mi restas am-cikatro!
 Amon li forĵetas tute,
 Kaj mi nur suferas mute.

Forta vento

**virino plendas, ke sia amato post la flirtaĵoj perfidas la amon kaj ne ŝin vizitas plu*

Furiozas forta vento.
 Li al mi galantis flirte,

